

Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO-ONDERWIJS EN-PROPAGANDA

Verschiĝnt maandelĝjks
Zeventiende jaargang
Nummer 3 (189)
MAART 1950

Vertegenwoordiger in Nederland :
LEEN
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
postrek. 34563 van P.M. Mabesoone
Pythagorasstr. 122 Amsterdam O.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTEN-BOND
POSTBUS 342, BRUSSEL
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDGELDEN :
* Leden : 75 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonende leden : 25 fr.
(* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN :
België : 60 fr.
Ceteraj landoj : 75 bfr.
Proefn. : 5 fr. (1 r.k.)

DOKUMENTA SERVO

KIO OKAZIS EN 1949 ?

Jarkroniko pri la Esperanto-movado.

(daŭrigo).

Sennacieca Asocio Tutmonda (S.A.T.), kiu varbas siajn membrojn precipe inter la laboristoj, kompreneble suferis pro la malfavora ekonomia kaj politika situacio. Tamen laŭ membronombro ĝi iom progresis. La jarlibro 1949 enhavas adresojn de preskaŭ 6000 membroj en 41 landoj. La membronombro estis komence de oktobro 5134, tio estas 124 pli ol unu jaron antaŭe, kiam ĝi nombris 5010 membrojn. La monata gazeto « Sennacieca » atingis eldonkvanton de proks. 6000 ekz-oj. De la 30-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto okazis en Parizo la 22-a S.A.T.-kongreso. Partoprenis entute 1385 personoj el 15 landoj, inter kiuj ankaŭ el Alĝerio, Argentino, Brazilo, Bulgario, Finnlando, Islando, Portugalujo kaj Usono. Por la unua fojo post la milito ĉeestis germanaj S.A.T.-anoj, sed aliflanke neniu el la pli ol 100 ĉeĥoslovakaj anoj kiuj aliĝis, povis ĉeesti. La kongrespropoj plejparte koncernis organizaĵajn aferojn escepte de tiu pri la linva institucio de la movado. Tri foje aperinta gazeto « La voĉo de l'kongreso » antaŭ kaj ĉe la kongreskomenco informis la partoprenantojn pri ĉio sciinda. Saĝas, ke relative multaj kongresanoj ne ĉeestis la laborokunsidojn. Ĉi tiu fakto las eviti la aliĝon de ne sufiĉe seriozaj personoj, sed taŭgan solvon

por tiu problemo oni ankoraŭ ne trovis. Ekster la oficialaj kunsidoj okazis prelegoj kaj diskutoj i.a. pri la gesto de Garry Davis, la historio de S.A.T., la kolonia problemo, forto kaj malforto de la homaro, kaj magio hieraŭ kaj hodiaŭ, kiuj estis instruaj kaj altiris sufiĉe da ĉeestantoj. Cetero el la agado de S.A.T. estas menciinda la aperigo de la duvoluma « Leteroj de Zamenhof » kaj la biografio « Roza Luksemburg ».

Kristana Esperantista Ligo Internacia (K.E.L.I.) nombris en 1949 proksimume 800 membrojn. Ĝi kunvenis okaze de la universala kongreso en Bournemouth. Oni decidis i.a. elekti komitaton por eldoni kantlibron de K.E.L.I. Okazis du diservoj: ĉe unu el ili parolis neangloj kun angla traduko kaj pro tio ĝi efikis ankaŭ propagande. La nederlanda sekcio de K.E.L.I. organizis bone sukcesintan internacian renkontiĝon en Teylingerbosch, kiun ĉeestis proks. 140 personoj el 8 landoj. La programo konsistis el interkonatiĝa vespero, diservoj, bibliostudado, prelegoj, kunsido de K.E.L.I. kaj ekskursoj. En Tostarp (Svedujo) okazis K.E.L.I.-kurso, kiu partoprenis kvardeko da personoj. La orĝano de K.E.L.I., « Dia Regno », eldonata en Svedujo, pliampleksiĝis kaj atestas pri viala agado de kelkaj landaj sekcioj.

G. P. de Bruin.

LA XVII-a KONGRESO DE L.E.E.N. EN GRONINGEN

Kiu ne konas Groningen ne konas Nederlandon.

Groningen, la ĉefurbo de la samnoma provinco havas 130.000 enloĝantojn kaj estas la kultura kaj komerca centro de la nordaj provincoj. En la centro de la urbo troviĝas la cent metrojn alta Martinituro, la simbolo de la urbo, kiu dum jarcentoj vidis la urbon kreskadon kaj labori ĝis tiu urbo en la nuna tempo farigis la tria komercurbo de Nederlando. Ĝi estas urbo bela kaj moderna kaj... Ho pardonu, ĉu vi jam sciis tion? Nu jes, tiajn sciindaĵojn vi povas trovi en diversaj geografiaj lernolibroj kaj enciklopedioj, sed ĉu vi ankaŭ scias, ke tiu

le aranĝita por ke vi ne estu devigata prepari varman manĝon, kiam vi estos reveninta hejmen. La kongreso finiĝos sufiĉe frue, por ke vi povu forveturi proksimume je la 5-a horo.

Speciala allogaĵo estas, ke ankaŭ eksterlandanoj vizitos nian kongreson; ni i.a. atendas karavanojn el Flandrujo kaj Danujo.

Do ne hezitu, sed aliĝu!!!

La kongresotizo estas g. 3,— antaŭ la 1-a de aprilo. Post tiu dato g. 3,25. Kongresotizo por unu tago resp. g. 1,75 kaj g. 2,—. La prezoj por la komuna lunĉo kaj festmanĝo estas resp. g. 1,75 kaj g. 2,25 (inkluzive de trinkmo-



Martinituro kun preĝejo.

urbo kun sia « olle grieze toren » vere meritas la nomon « pronkjewail in golden raand »? Ĉu vi scias, ke en Groningen vi povas veturi en trolibuso, ke senpage vi povas promeni tie sur « glenne riebe » (en kiu alia urbo en la mondo tio estas ebla?) kaj premi la manon al famaj esperantistoj kiaj nia 70-jara pioniro Holleman kaj Frieso Moolenaar, la komponisto de « L.E.E.N.-kanto » kaj « La Vojo », dume maĉante « molle » fabojn, kiuj ne estas molaj sed malmolaj? Ne, tion vi ne sciis kaj tial vi nepre vizitu tiun urbon! La kongreso donos al vi bonegan okazon. Krome, la kongresprogramo ja estas tre alloga! Vi juĝu mem:

Sabato la 8-an de aprilo:

Posttagmeze: oficiala malfermo de la kongreso en « De Harmonie », Oude Kijk in 't Jatstraat, Groningen. (Perdinte la vojon vi, nur balbutu « Klekentjestroade » kaj ĉiu indigeno komprenos vin!) Akcepto de la komunumestraro.

Vespere: Interkonatiĝa kunveno en kiu amuzaj kaj dancado (atentu flandroj!) alternos. Vi povos interkonatiĝi babillante kaj dancante kaj krome ĝui groningenajn kostumojn kaj kutimojn kaj kelkajn skeĉojn.

Dimanĉo la 9-an de aprilo:

Diservo en la preĝejo de unu el la plej belaj maljunulejoj; predikos Esperante pastro v. d. Meiden el Hoogezand. Jarkunveno de L.E.E.N. Komuna lunĉo. Prelego de s-ro Mason Stuttgart el Anglujo. Daŭrigo de la jarkunveno. Faka kunsido de U.E.A.-delegitoj. Post la laboro en la kunvenoj vi povos ĝui festmanĝon kaj poste festvesperon kaj balon kun tre varia programo.

Lundon la 10-an de aprilo:

Aŭtobusoj kondukos vin tra la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj kaj donos al vi la okazon konatiĝi kun parto de Nederlando, kiun vi generale ne ofte vizitas. La varma lunĉo post la ekskurso estas specia-

no). La prezo por la ekskurso estas g. 2,25; la varma lunĉo kostas g. 1,75.

Anoncu vin plej baldaŭ kaj mendu hotelĉambron aŭ gastloĝadon ĉe privatuloj ĉe la sekr. fino de la L.K.K., s-ino L. de Vries-Kanning, Witte de Withstraat 25, Groningen, sendante la ŝuldatan monon ĝire al la kasisto E. Albers, E. Casimirlaan 1-a, Groningen, poŝtkonto 536911. Se vi ne posedas aliĝilon vi petu ekzempleron de via sekcia sekretario, la sekr. fino de la L.K.K. aŭ la ĝen.sekr. de L.E.E.N. Ne prokrastu! Aliĝu tuj!! La akceptejo estos malfermata la 8-an de aprilo je la 2-a horo posttagmeze. Groningen atendas vin!

V.E.E.-anoj!

En malpli konata parto de Nederlando, okazos ĉi-jare la kongreso L.E.E.N.! Ĉi tiu estos instrua kaj samtempe agraba.

Kaptu la okazon: vi pruvas la realecon de nia Benelux-kunlaboro, pasigos agrablajn momentojn en internacia rondo kaj certe lernos ion el organiza vidpunkto!

Direktu vin al la sekretariino aŭ la via sindona

T. Van Gindertaelen, ĉefred.
Postbus 342 Brussel

JAARVERSLAG 1949 EXAMEN-COMMISSIE (Ned.)

bestaande uit 12 leden, nl.:
uit FLE de heren G. J. Degenkamp, W. F. Kruit en O. Brandsma; uit LEEN de heren mr A. J. Kalma, H. A. Appel en mej. H. M. Mulder; uit NK de heren P. Heilker, Fr. Wigbertus van Zon en L. G. C. de Jong; uit NCEV de heren H. A. de Hoog, R. van Spronsen en J. Hommes. Voorzitter de heer P. Heilker. Secretaris-penningmeesteresse mej. H. M. Mulder.

Gedeegeerde van de Minister van O., K. en W. de heer J. van Andel (Inspecteur Gynasia).

Examinatoren: alle commissieleden en enkele dames en heren uit de samenwerkende organisaties.

Vier examens vonden plaats nl.:

26 Mei	Amsterdam
26 Mei	Groningen
18 Juni	Den Haag
5 November	Utrecht

Statistiek betreffende het aantal candidaten:

	Aange-		Opge-		Ge-	
	A	B	A	B	A	B
A'dam	42	5	41	5	27	2
Gron.	26	1	25	1	15	1
D. Haag	33	1	31	1	20	0
Utrecht	60	16	58	15	41	11

Totaal 161 23 155 22 103 14

Overzicht van het aantal geslaagden uit de verschillende organisaties:

FLE	43	8
LEEN	21	4
NK	7	-
NCEV	3	1
Niet georganiseerd	29	1
Totaal	103	14

De kasstaat wijst een voordelig saldo aan van f. 217,11.

De jaarvergadering, die werd bijgewoond door de rijksgecomiteerde dr W.v.d.Ent, insp. Gymn. en M.O., vond op 11 Febr. 1950 te A'dam plaats. De be-
stuursverkiezing gaf het volgende resul-

taat: H. A. de Hoog, voorzitter, mej. H. M. Mulder, sekr. penningm.esse, G. J. Degenkamp, Mr A. J. Kalma en dr W. J. A. Manders vice-voorzitters. In 1950 zullen examens worden afgenomen op Hemelvaartsdag in Amsterdam en Zwolle, op 10 Juni in Den Haag en op 4 Nov. in Utrecht. Het dictee Romt te vervallen voor de B-candidaten; overigens zijn de exameneisen gelijk aan die van 1949. De commissie vestigt er nogmaals de aandacht op, dat de candidaten, die zich aanmelden voor het A-examen, « Esperanta Krestomatio » geheel gelezen moeten hebben.

JUBILEANTOJ

En la januara numero pri kiu mi ne scias, ĉu intertempe la unoj jam ricevis ĝin — vivu nia Benelux-kontrakto sed « malvivu » la rapidemaj (?) doganistoj — ni jam pretere menciis la fakton, ke s-ro E. de Wolf festis en januaro sian 25-jaran prezidantecon de sekcio Haarlem. Nome de la ĉefestraro s-ro P. W. Baas transdonis donacon al la jubileanto kaj kore gratulis lin. Volonte ni kiel postmanĝan mustardon ankoraŭ publike gratulas s-ron de Wolf en ĉi tiu gazeto, sed mustardo ĉiam bongustas, ĉu ne, Lupo?

Iom varigante la devizon de la groningena L.K.K. mi, povus diri « kiu ne konas s-ron Holleman, ne konas Groningen ». Nia ĉiam agema veterano farigis la 10-an de febr. 70-jara kaj samtage festis sian 40-jaran esperantistecon. Jam antaŭ la milito s-ro Holleman kursgvidis en Roozendaal, poste en Bergen op Zoom, kie li dum 26 jaroj estis prezidanto de nia tiea sekcio. Li prezidis la komitaton por starigo de Zamenhof-monumento en Bergen op Zoom, inaŭgurita en 1933, iniciatis kelkajn esperantistajn « Benelux »-kunvenojn, prezidis en 1934 la kongreson de L.E.E.N., kies vicprezidanto li estis de 1931-1940 kaj nuntempe prezidas la propagandkomitaton de nia groningena sekcio. Nome de la ĉefestraro s-ro W. H. Mook transdonis donacon al la jubileanto, kies aktiveco estas laŭdinda ekzemplo por ni ĉiuj.

ADIAŬO DE s-ro P. HEILKER

La 11-an de febr. s-ro P. Heilker lastfoje prezidis la kunvenon de la ekzamenkomitato, konigante la deziron rezigni pri ĉiuj funkcioj en la Esp.-movado favore al pli junaj aktivuloj. Speciale en la katolika Esp.-movado s-ro Heilker havas multajn meritojn, sed ankaŭ la ne-katolikoj ŝuldas dankon al li pro ĉio, kion li faris. Multajn jarojn li ekzamenis, kelkfoje prezidis katolikajn kongresojn, estis ano de la L.K. kaj dum kelkaj jaroj reduktoro de N.K. Pli konata ol s-ro Heilker mem estas eble lia sonora voĉo, kiun oni ofte povis aŭdi, kiam li instruis antaŭ la mikrofono de K.R.O. Ni esperas ankoraŭ ofte renkonti lin kiel « ordinaran » verdstelulon en Esperantujo!

OBSERVOJ

LA STUDANTO

FL.L.E.

Varbkonkurso.

Aldone al la premio-listo kiu aperis en la antaŭa numero de F.E., ni povas precizigi la unuan individuan premion: la senpagan restadon en eksterlanda Esperanto-aranĝo. Ĉi-jare, kiel unkaŭ okazis dum 1950, FL.L.E. kunlaboras kun L.E.E.N. en la aranĝado de someraj kursoj, ĉi-foje en Arnhem. La sukceso de tiuj feriaj kursoj estas jam certa ĉar partoprenos, krom nederlandanoj, dana karavano, kaj ni esperas ke kelkaj geesperantistoj, celante la Universalan Kongreson en Parizo, travojaĝos nederlandon, kaj ĉeestos en Arnhem. Nia ĉefredaktoro, Dro Van Gindertaelen, reprezentos tie nian Ligon kaj gvidos kurson. En tiu Beneluksa rondo, oni bonvenigos ankaŭ la gajnonton de nia varbkonkurso. Do, nenia senkuragiĝo: ne nur la florado de la Ligo, sed ankaŭ la premio valoras la penon. Varbu novajn membrojn — revarbu la ne-fidelemulojn. Ni instigas la sekiestrojn preparoli la varbadon dum la venonta laborkunveno de la sekcio.

Novaj sekcioj.

Kiam ni raportis pri la plivigliĝo de la kernoj, por ke novaj sekcioj ekestu, ni ne pensis ke tiel baldaŭ nia deziro estos plenumita. Jes, kura samligano, denove fondiĝis sekcio, kaj denove ĝi situas en la marborda provinco: antaŭ kelkaj semajnoj, la sekcio Roeselare re-naskiĝis (ĉar antaŭ la milito en 1936, ĝi jam foje «naskiĝis»). Inter la gemembroj ni rimarkas veteranojn, kiel Sinjoror Braekvelt, kaj W. Nollet, sed la plej granda parto konsistas el ĝejnuloj. Ni deziras al sekcio Roeselare prosperan estontecon.

Vintraĵ kursoj.

Kelkaj sekcioj organizis vintraĵ kursojn. Ni petas al la sekretarioj raportu mallonge pri la rezultato. Ni i.a. ŝatus ekscii:

1. Propagandmaniero
2. Medio
3. Ejo
4. Nombro da gekursanoj komence
5. Nombro da gekursanoj je la kursfino
6. Metodo-lernolibro
7. Kotizo.

Vi ne hontu se la rezultato ne estas tre brila, sed raportu la veran situacion. Via sekretario.

bone forlogiĝi per la analogio kun komenci kaj diri: mi ĉesas mian laboron).

O KAJ IGO

Pluraj verboj, kiuj en la nederlanda lingvo estas transitivaj kaj netransitivaj (breken, beginnen, rollen, veranderen, draaien, smelten) en Esperanto estas transitivaj kaj por fari ilin netransitivaj oni devas aldoni la sufikson -ig (mi rulas le barcelon - la barelo ruliĝas; mi rompas la vazon - la vazoj rompiĝas), sed ofte oni ne sufiĉe atentis la fakton, ke la samo validas por substantivoj, derivitaj de tiaj verboj. Estas diferenco inter ŝanĝo kaj ŝanĝiĝo, turno kaj turniĝo; intereso kaj interesiĝo, k.t.p. Kelkaj ekzemploj: Oni ŝanĝis la daton de la kunveno, do faris ŝanĝon koncerne la daton. La sorto povas subite ŝanĝiĝi; la ŝanĝiĝo povas esti favoraj aŭ malfavoraj. Mi interesis lin en komerca entrepreno, en kiu mi mem posedas grandajn interesojn (intereso = belang). Li interesiĝis pri Esperanto sed ne montris sian interesigon (interesiĝo = belangstelling). Kiam li rimarkis la movigon de la kurteno (la kurteno moviĝis) li faris subitan movon (li movis sin) pro timo. Mi ne vidas ian neceson por fari rompon en tiu kutimo. Kio kaŭzis la rompiĝon de la branĉo? La kolera patro efektiviĝis la disigon de la gemantoj. La disigo de la edzino kaj infanoj estis malfacila al li. La instruisto punis la lernanton pro renverso de plena inkujo. La renversigo de la boato okazis subite.

Traduku:

Een soldaat wendde zich tot de kapitein met het verzoek een paar dagen verlof te mogen hebben. «Mijn vrouw schrijft me», zei hij, «dat het momenteel zo druk is in de winkel, dat ze het niet alleen meer af kan». «Dat is vreemd», zei de kapitein, «en ik krijg juist vanmorgen een briefje van haar, waarin ze schrijft, dat wanneer haar man om verlof mocht vragen, ik dat maar niet moet toestaan, omdat hij toch maar in de weg loopt.» «Dank U», zei de soldaat, terwijl hij naar de deur ging. Bij de deur keerde hij zich om en zei: «Ik vraag excuus, kapitein. Er zijn twee leugenaars in dit regiment. Het spijt me, dat ik er één van ben. Ik ben niet getrouwd...»

Traduku:

De voorraad is op; hij is op de hoogte; hij was gisteren vroeg op; ik sta er op; hij stond op het punt te vertrekken; op aanraden van; op en top; op de koop toe; op de fles gaan; op wacht staan; ik ben totaal op; op de proef stellen; op de pof kopen; op goed geluk af; op een idee komen.

Uitwerkingen van Vlaamse cursisten vóór 20 Maart aan V.E.B., Studanto, postbus 342, Brussel; voor Nederlandse cursisten aan A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Z.

INTER ANONIMULOJ.



Jam ofte mi spertis, ke troscivolemaj naturoj deziris ekscii kiu sin kaŝas sub mia pseŭdonimo. Ĉar tiu redakcia sekreto ŝajnas bone gardata, iuj provis ruzajn rimedojn. Ekzemple tiu fraŭlino, kiu sendis al mi rozkoloran kaj parfumitan letereton kun jena enhavo: «Kara Pikĉjo, mi multe ĝuas viajn ĉiumonatajn Pik-aĵojn. Mi ne dubas, ke vi estas la ideala esperantisto kun kiu korespondi estas granda plezuro. Mi estas dudekjara, beleta kaj svelta, blondhara kaj bluokula knabino. Se laŭaspekte vi similas vian virecan prozon, mi ne dubas ke tre baldaŭ ni iĝos tre intimaj. Se vi ne deziras respondi, sendu almenaŭ, laŭ sama vojo, vian ŝatatan foton. Mi kapablas gardi sekreton. Via adorantino».

Tre humile mi ja konsentas ke mi estas ideala esperantisto: krom en kazoj de jorgesoj, mi ĉiumatene recitas la Preĝon sub la Verda Standardo, se dum la Verda Monato ne pluvas mi flirtigas Esperanto-flageton ĉe mia biciklo kaj okaze mi ĉe partoprenas kongreson, se almenaŭ duona dekedo de miaj preferataj korespondantinoj ĉeestas. Unuvorte, komforte sidanta sur la Esperanto-ĉaro, mi entuziasme ĝin puŝas antaŭen.

Tamen, por resti la idolo de mia adorantino, mi, saĝe kaj tre prudente, preferis ne respondi...

PIK.

WAT DOOR ESPERANTO TOT STAND KWAM.

Door de secretaris van de Jaarbeurs in Lyon werd een oproep gericht tot onderwijzers in alle delen der wereld om kindertekeningen te zenden voor een tentoonstelling. Voor de correspondentie werd uitsluitend van Esperanto gebruik gemaakt. Het succes was buitengewoon en duizenden tekeningen werden alzo verzameld. Tentoonstellingen in Lyon, en later in andere steden van Frankrijk, trokken de aandacht van de officiële instanties en dhr Herriot nam zitting in het Comité van Aanbeveling.

Na een omzwerfing in Italië kwam het materiaal naar Nederland en werd van 21 Januari tot 1 Februari geëxposeerd in het Nederland Museum voor Onderwijs en Opvoeding, op de Prinsengracht te Amsterdam. Ook daar werd van officiële zijde belangstelling ondervonden. Dhr A. de Roos, Wethouder voor Onderwijs en Kunstzaken te Amsterdam, verklaarde zich bereid zitting te nemen in het Comité van Aanbeveling. Kortom, een mooi succes dank zij Esperanto en voor Esperanto.

ESPERANTO OP INTERNATIONALE ANTWOORDCOUPON ?

Vrijwel iedereen kent de internationale antwoordcoupon dat door al de landen aangesloten bij de Post-Unie uitgegeven wordt en de waarde heeft van een postzegel voor een brief naar het buitenland. Van deze coupons zijn miljoenen exemplaren in omloop. Op de ommezijde van dergelijke coupons is de taks in vijf talen aangebracht, w.o. het Chinees, maar Esperanto ontbrak tot dusver. Hierin komt denkbaar verandering. De Duitse Esperantistenbond heeft het gebruik van Esperanto op de internationale antwoordcoupons de directeur van de Duitse postkerij verzocht in overweging te nemen. Ook de directeur van de Oostenrijkse postkerij heeft zich voorstander verklaard van het gebruik van Esperanto op de coupons. Op het internationaal congres van de Post-Unie, dat dit jaar te Brussel zal worden gehouden, wordt hierover beslist.

DUIZEND KINDEREN LEREN ESPERANTO.

Niet in Amsterdam of Brussel, Rotterdam of Antwerpen maar in Hamburg waar ook de politie open oog heeft voor Esperanto. Vijftig politiemannen doen dienst in Hamburg met de armband: Esperanto.

ESPERANTO IN BRITS MINISTERIE. «The Foreign Office Language Society» besloot een Esperantocursus te organiseren voor diplomaten, functionarissen en officieren van leger en politie. De cursussen worden gegeven in het Ministerie voor Binnenlandse Zaken (Home Office, Whitehall.)

ESPERANTO-ONDERWIJS IN DUITSLAND.

De Kultusminister van Nieder-Saxen liet aan de Duitse Vereniging van Onderwijzers-Esperantisten een som overhandigen van duizend Deutsche Mark voor het organiseren van cursussen in de internationale taal voor het onderwijzend personeel van Nieder-Saxen. Bij ministerieel dekreet zullen de onderwijskrachten aangezet worden deze cursussen te volgen.

Laat ik deze keer beginnen met een hartelijk welkom aan onze nieuwe cursisten, die, misschien aangemoedigd door mijn inleidend babbeltje in het vorige nummer, hun taken voor de eerste maal inzenden. Verschillende Nederlandse inzenders voelden zich gedupeerd door het niet ontvangen van het Januari-nummer. Hopelijk hebben ze dat intussen nu gekregen. Zo niet, dan kunnen zij natuurlijk alsnog de uitgewerkte taken uit het December-nummer ter correctie inzenden.

En dan beginnen we nu maar weer volmoed met de uitwerking van de opgaven in het vorige nummer.

Hier volgt dan de correctie van de brief:

Hieraŭ mi ricevis («estas ricevinta is eigenlijk niet juist; ricevinta is wel is waar een deelwoord, maar gedraagt zich als een bijv. naamwoord en u kunt toch ook niet zeggen: hieraŭ mi estas malsana») vian leteron. Mi kore dankas vin pro (por) la fotoj, kiujn vi sendis al mi kaj kiujn (lijd. voorwerp!) mi trovas tre belaj (bep. v. gesteldheid). Ĝi kune (enfermite kunt u niet gebruiken, want dan zou de arme briefschrijver zelf ingesloten zijn!) mi sendas al vi (vin is fout) kelkajn bildojn pri (de) la urbo en kiu mi loĝas. La unua prezentas mian domon kaj la du aliaj montras al vi la grandan placon kaj la urban teatron. Antaŭ tri semajnoj (tri semajnojn pasinte is fout!) mi ricevis leteron de italo (!) el Torino, la urbo kie okazos la kongreso (onderwerp!) de S.A.T. Ĝi (niet weglaten) estis la unua letero el eksterlando, kiun (betr. voornaamw.) mi ricevis kaj la tagon kiam (en kiu) ĝi falis en mian

sian enirbileton, se (niet kiam) almenaŭ la programo plaĉis al li. Se la vizitinto ne estos kontenta, li ŝuldos nenion (neniom). Post la una provo montriĝis, ke el la okcent dek kvar vizitintoj sepcent kvin montris sian kontentecon, pagante siajn enirbiletojn. Efika (bona) reklamo!

(Tu) fabrikisto, kiu estis enpresiginta anoncon per kiu li serĉis vendiston (kiu serĉis vendiston per anonco) ricevis leteron de iu, kiu skribis, ke li estas la plej bona (lerta) vendisto en (sur) la mondo. La fabrikisto dungis lin, donante al li tri artiklojn por la vendado. Tutan semajnon la vendisto forrestis, nenion sciigante pri si. Tiam la fabrikisto fine ricevis (la) jenan telegramon: Ne mi (ne vóór het woord, dat ontkend wordt) estas la plej lerta vendisto. La plej lerta vendisto estas la viro, kiu sukcesis vendi tiujn tri artiklojn al vi.

En hier volgen enkele nieuwe opgaven:

Uzu la ĝustajn prepoziciojn:

1. Bonvolu doni — mi tason — teo — multe — sukero, sed — lakto. 2. Precize — la dua horo li foriris kaj li diris, ke li forrestos — du horoj, sed li revenis jam — unu horo. 3. Ĉu vi legis — la gazeto — la katastrofo? 4. Zamenhof laboris — multaj jaroj — sia projekto — internacia lingvo. 5. Mia ĉapelo forflugis — la vento kaj pendigis — branĉo — dika arbo. 6. Li suferis — reŭmatismo. 7. La dronanto kriis — helpo. 8. Li estis mokata — ĉiuj najbaroj, ĉar li rigardis — sia digno saluti ilin. 9. Li iris — fiere levita kapo, portante zonon — la korpo. 10. Mi konsilis — li resti hejme, sed — la fakto ke la pluvo falis torente — la ĉielo, li tamen eliris. 11. Mi kredis renkonti tie

MEDEDELINGEN VAN ONZE BOEKENDIENSTEN

Vrienden,

Verrijkt Uw Esperanto-kennis door het lezen van een goed boek! Doet uw keuze uit één der onderstaande werken:

Moro de Trajno (detective-roman vlot geschreven)	f. 5.30	bfr. 63.—
La Dormanto Vekigás (H. G. Wells)	f. 3.10	bfr. —
Pro Iŝtar (oorspr. roman)	f. 4.50	bfr. 61.—
Palaco de Danĝero (roman uit de tijd van Mad. de Pompadour)	f. 3.50	bfr. 48.50
Leteroj de Zamenhof I-II (buitengewoon belangrijk!)	f. 8.55	bfr. 130.—
Skizoj pri Nederlando (mooi geschenk voor Uw buitenl. vrienden)	f. 1.75	bfr. 34.50
Novaj E-Historietoj (gemakkelijke leerstof):	f. 1.90	bfr. 22.50
Originala Verkaro de Zamenhof (een standaardwerk!)	f. 11.25	bfr. 152.—
Plena Vortaro (moet iedere Esperantist bezitten)	f. 11.40	bfr. 175.—
Esprinoj de Sentoj (E. Privat)	f. 0.80	bfr. 12.—
Komercaj Leteroj	f. 1.30	bfr. 14.—
Granda Aventuro (F. Szilagy)	f. 4.75	bfr. 55.—
La multkolora Libro (aangename leerstof)	f. 1.35	bfr. 18.50
Murdo en la Orienta Ekspreso	f. 1.00	bfr. 16.—
La Knaboj de Paulo-strato (M. Molnar)	f. 1.00	bfr. 16.—
Princino de Marso	f. 1.00	bfr. 16.—
Sep Vango frapoj	f. 1.90	bfr. 30.—
La Virineto en Bluo (M. Stuttard)	f. 1.90	bfr. 30.—
Dro Dornier (alleen voor volwassenen)	f. 3.75	bfr. 49.—

Atentu, ĉiu aĉetanto ricevas en marto kaj aprilo donacon. Ju pli alta la faktura prezo, des pli multvalora la donaco!

Nepe atentu niajn bagatelajn prezojn por insignoj: por butontruo f. 0.35 — broĉo, tutverda f. 0.50 —

Porti voor koper. Bestellingen aan:

Boekendienst LEEN, Z-O-Singel 5, Bergen op Zoom (giro: 76915)
Vlaams E-Instituut, Diepestr. 44, Antwerpen (giro: 3268.51; Tel.: 244.30)

leterkestoj, mi estis tre ĝoja. Al mi ankoraŭ mankas (manki is niet missen, maar ontbreken) bona vortaro (onderwerp) kaj ofte diversaj malfacilaĵoj (niet malfacilecoj; het gaat hier niet over een eigenschap, maar over concrete moeilijkheden) embarasas (embarasi is overgankelijk) min, sed mi esperas, ke vi povos kompreni mian leteron malgraŭ la eraroj (malgraŭ is een voorzetsel), kiujn mi certe faris. Mi tamen ne hontas (zich schamen is hont) pri tiuj eraroj; ĉar mi studis (studinte is fout; het bijw. deelw. kan alleen gebruikt worden als hoofd- en bijzin het zelfde onderwerp hebben; het onderwerp van de hoofdzin is echter eviti eraroin; het verborgen onderwerp van de bijzin mi) nur dum tri monatoj, estas malfacile por mi eviti erarojn. Ĉu mi estas prava, jes aŭ ne? Sendube estas necese, ke mi daŭrigu (uitgang u na estas necese!) la studadon ankoraŭ kelke da monatoj, sed mi ne perdos la kuragon, ĉar mi volas fari ĝi sperta esperantisto (naamw. deel v.h. gezegde, dus eerste naamval!) Morgaŭ mi respondos al mia franca amiko, kiu skribis, ke li intencas (tijd van de directe rede) partopreni en la kongreso de U.E.A. en Parizo, kiu komenciĝos (onovergankelijk!) je la kvina de aŭgusto. Nun mi finas la leteron kaj kore salutas vin!

U ziet, er zaten heel wat foutjes in. De meeste inzenders hebben er wel heel wat ontdekt, maar er waren er ook, die in hun ijer de capaciteiten van deze briefschrijver wat te laag hebben aangeslagen en meer fouten hebben gevonden dan er werkelijk waren.

Uitwerking van de beide teksten voor meergevorderden:

(U) kinejdirektoro, kiu tre suferis pro la konkurenco, elpensis la jenon. Li anoncigis (ordonis publikigi), ke ĉiu rajtas senpage enri (en) lian teatron kaj nur elirante (ĉe la eliro) devos pagi

nur lin, sed — li ankaŭ Johano troviĝis tie kaj mi do havis la okazon danki lin — lia helpo. 12. La strato estis kovrita — neĝo. 13. La kuglo flugis — la arbo kaj la pafisto maltrafis sian celon. 14. Ĉu tiu ĉapelo, farita — pajlo, apartenas — vi?

Vertaal:

1. De vergadering besloot de tegenwoordige penningmeester tot secretaris te benoemen. 2. Vader is al lang geleden vertrokken; toch heeft hij de trein gemist. 3. In 24 uur draait de aarde eenmaal om haar as. 4. Mijn broer en zijn vriend hebben gisteren het museum bezocht. 5. Laten we gaan, anders komen we te laat aan het station. De trein vertrekt over een half uur. 6. Nauwelijks waren we thuis of het begon te regenen. 7. Bleek en vermoeid kwam hij 's avonds laat terug.

DAŬRI KAJ ĈESI

Daŭri kaj ĉesi ambaŭ estas netransitivaj verboj, pri kies ĝusta signifo multaj esperantistoj eraras. Daŭri signifas: voortduren, voortgaan, stand houden, aanhouden, ekz. la milito daŭris kvar jarojn; lia gloro daŭros tra la jarcentoj; belo pereas, virto daŭras; la diskutoj daŭris ankoraŭ, kiam ni alvenis; tiel daŭri ni ne povas. Daŭrigi signifas: voortzetten, vervolgen, doorgaan met; doen aanhouden, ekz. la vento daŭrigis la froston; daŭrigi la laboron (Zamenhof en «Lingvaj Respondoj») diris: ne estas bone diri, kiel mi mem bedaŭrinde faris kelkfoje: mi daŭrigas labori; oni devas diri: mi daŭrigas mian laboron aŭ mi laboras plu). Ĉesi signifas: ophouden, een einde nemen, uitscheiden, ekz. la pluvo ĉesis: li ĉesis paroli; ĉesu, mi petas! Ĉesigi signifas: doen ophouden, een eind maken aan, stopzetten, ekz. la instruisto ĉesigis la kurson; la vento ĉesigis la pluvon; li ĉesigis sian laboron (Zamenhof diris en «Lingvaj Respondoj»: ne estas

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. « LA ESTONTO ESTAS NIA »

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst : Mr. A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, Tel. 96160.
 Penningm. : P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postr. 34563.
 Boekendienst : H. A. Appel, Z.O.singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915.
 Bibliotheek : E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
 Propaganda-dienst : H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
 Schr. cursus v. gevorderden, examen B: H.A.Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom.
 Alg.Ned.Esp.Examen-comm.: Mej.H.M.Mulder, Zilvermewuistr. 29, Badhoevedorp
 Cefdel. U.E.A. : P. Moen, Schaarbergenstraat 104, Den Haag, postrek. 79167.

KOMUNIKOJ DE LA CEFESTRARO

La ĝen. kasisto, atentigante la sekciajn estrarojn pri par. 38 de nia regularo, afable petas la sekciajn kasistojn, ĝire pagi la kotizon por la unua duonjaro 1950 per poŝtkonto 34563 de «Ned. Esperantisten-Vereening «L.E.E.N.»

Kiel kutime aperos sur la tagordo de la jarkunveno la punktoj : kritiko pri la gvidado de la ĉefestraro kaj kritiko pri la redaktado de «Nederlanda Esperantisto». La sekciaj estraroj scigu la event. preparolotajn temojn antaŭ la 20-a de februaro al la ĝen. sekretario.

Flandra Ligo Esperantista intencas aranĝi Beneluksan aŭtobuskaravanon al la feriaj kursoj (18-26 julio) en Helsingör, kiun partoprenu V.E.B.- kaj L.E.E.N.-anoj. Informojn donas d-ro T. v. Gindertaelen, Leopoldstraat 99, Mechelen (por V.E.B.-anoj) kaj S-ro P. Mabesoone, Pythagorasstr. 122 Amsterdam O. (por L.E.E.N.-anoj).

La ĉefdelegito de U.E.A. sciigas, ke la kotizoj, fiksataj de U.E.A. por la Pariza kongreso, kiuj validas ĝis 31-3-'50, estas resp. g. 19,80, g. 9,90 kaj g. 4,40.

Tiuj, kiuj karavane (aŭtobuse aŭ vagonare) deziras vojaĝi al Parizo, petu detalan cirkuleron de la gvidanto s-ro H. Bakker van Tuyl v. Serooskerkenplein 33,I, Amsterdam-Z.

Ĉar en la januara numero de N.E. troviĝis diversaj proponoj por la jarkunveno, ni dissendis al ĉiuj sekciaj sekretarioj kelkaj cirkulerojn, menciatajn la plej urgajn komunikojn el tiu numero kaj aldonis kelkajn aligilojn por la groningena kongreso. La delegitoj al la jarkunveno bonvolu kunpreni ĉi tiun cirkuleron, se ili almenaŭ intertempe ne ricevis la «veran» gazeton. Espereble ĝi iam atingos niajn anojn!

ASOCIA JARRAPORTO 1949

(fino)

Biblioteko : La legemo kiu en 1948, eble pro la apero de nova katalogo, konsiderinde kreskis — la bibliotekisto pruntedonis en tiu jaro 263 verkojn — denove malkreskis en la pasinta jaro, kiam nur 127 libroj estis pruntedonataj. Estas strange ke nur malmultaj anoj profitas la okazon legi bonstilajn kaj interesajn verkojn, kiujn ili ja senpage povas prunti. La katalogo mencias, librojn ĉiuspecajn, kaj ĉiu facile trovos legaĵon laŭ sia gusto. La biblioteko akiris 10 novajn librojn, donacitajn de s-roj M. J. de Lange kaj A. J. Kalma.

Teatra Servo : Nur malgranda estis la nombro da sekcioj, kiuj en la pasinta jaro uzis materialon de la teatra servo. Al kelkaj sekciaj estraroj kaj membroj ni sendis laŭ ilia peto teatraĵetojn, deklamaĵojn kaj ekspozician materialon. Fine de 1949 la servo disponigis filmstrion pri Nov-Zelando al sekcioj, kiuj deziris okazigi lumbildprelegon.

Propaganda Servo : La gvidanto, s-ro H. Bakker ne sendis raporton.

Libro-Servo : La libro-servon gvidis en 1949 s-ro H. A. Appel, kiu bonege plenumis sian taskon. Montrigas, ke la anoj regule aĉetas verkojn kaj el la gajno pri 1949 la libro-servo jam povis repagi sian ŝuldon al L.E.E.N. (g. 263,32), antaŭpagitan por kovri la preskostojn de «Esperanta Krestomatio». Bedaŭrinde diversaj eksterlande aperintaj verkoj pro devizaj kaj aliaj malfacilaĵoj ankoraŭ ne estas liveribla.

Nederlanda Esperantisto : Dank' al la Benelux-kontrakto aperis la pasintan jaron 11 tablotukformataj numeroj de «Nederlanda Esperantisto». En la komencaj monatoj «Flandra Esperantisto» kaj

«Nederlanda Esperantisto» havis apartajn kolonojn, sed ĉar la plialtigintaj preskostoj minacis endanĝerigi la budĝeton, la enhavo de ambaŭ gazetoj poste fariĝis la sama. La redaktadon de la nederlanda parto prizorgis Mr A. J. Kalma, la redaktadon de la flandra parto kaj la impozadon d-ro T. v. Gindertaelen, kiu meritas nian dankon pro la ampleksa laboro farita de li, kaj necesa por pretigi ĉiumonate bonaspektan interesan gazeton.

De Esperantist : En 1949 aperis 4 numeroj de «De Esperantist», kiujn ricevis ĉiuj niaj donacantoj, dank' al la akurata laboro de la administranto s-ro E. A. Burk. Ni refoje atentigas niajn anojn pri la artikolo «De Esperantist», aperinta sur paĝo 1 de la februara numero '50 de Nederlanda Esperantisto», kiu denove akcentas la grandan propagandan valoron de tiu gazeto.

Skribaj kursoj : Nur malmultaj studentuloj mendis la skriban kurson por komencantoj, gvidatan de s-ro S. S. de Jong, sed tamen la kurso rezultigis modestan financon profiton. Pli da kursanoj havis s-ro H. A. Appel, kiu gvidas la skriban kurson por progresintoj kaj estontaj B-kandidatoj.

Kongreso : Dank' al la bonega kunlaboro inter la agemaj Haarlem-anoj kaj la meteorologia instituto en De Bilt la proks. 250 gepartoprenintoj de nia XVI-a kongreso, inter kiuj diversaj eksterlandanoj, ĝuis agrablan kelktagan kuneston en amika rondo. Ankaŭ laŭ financa vidpunkto la kongreso fariĝis sukceso.

Someraj aranĝoj : Sub gvidado de s-ro R. Slot pluraj vojaĝemuloj partoprenis la Benelux-karavanon al Helsingör, por ĉeesti la tieajn somerajn kursojn. Tuj poste komenciĝis la feriaj kursoj en Kerk-Avezaath, gvidataj de f-ino H. M. Mulder kaj s-roj T. v. Gindertaelen, A. J. Kalma kaj T. Morariu. Malgraŭ la aĉa vetero la bona humoro de la partoprenintoj montriĝis nedifektebla kaj proks. 90 personoj el 6 diversaj landoj pasigis neforgeseblan semajnon en «Wetvreeden». Sub gvido de s-ro H. Bakker diversaj anoj vojaĝis post la feriaj kursoj al Bournemouthe, por ĉeesti la universalan kongreson, pri kiu aperis detala raporto en la decembra numero de «Nederlanda Esperantisto».

N.C.K.E. : La pasintan jaron N.C.K.E. E. kunvenis nur unufoje, ĉefe pro monmanko estis malfacile entrepreni ion kaj oni jam parolis pri likvido. Por efektiviĝi rezolucion, akceptitan de la Haarlem'a jarkunveno kaj por plibonigi la kontakton inter la kunlaborantaj asocioj kaj se eble starigi kontakton kun kelkaj fakaj organizoj, okazis laŭ iniciato de la ĉefestraro de L.E.E.N. la 25-an de junio kontaktkunveno en Amsterdam, pri kiu detala raporto siatempe estis sendata al ĉiu, kiu interesiĝis pri ĝi. Kvankam ĉiuj samopiniis pri tio, ke la kunlaboro lasas multon por deziri kaj ke N.C.K.E. ne kontentige funkcias, la kunveno ne rezultigis ion pozitivan. Tamen la unua kunveno de N.C.K.E., okazinta komence de 1950 en A'dam estis sufiĉe esperdona kaj pruvis, ke la emo al kunlaboro ne forvaporigis. Prezidanto fariĝis s-ro A. v. Haren, sekr.-kasisto s-ro J. Pouli, vicprezidantoj s-roj C. P. Brakké kaj A. J. Kalma.

Ekzamena Komitato : En 1949 okazis 4 ekzamenoj, nome en Amsterdam, Groningen, Den Haag kaj Utrecht. El niaj anoj 21 akiris la A-diplomon kaj 4 sukcesis por B. Prezidanto de la komitato estis s-ro P. Heilker, sekr.-kasistino f-ino H. M. Mulder kaj vicprezidantoj s-roj G. J. Degenkamp, H. A. de Hoog kaj A. J. Kalma.

Oficejo «Esperanto ĉe la Instruado» : La reprezentantoj de la «Oficejo» kunvenis en 1949 trifoje sub prezidanteco de s-ro P. W. Baas. La kunlaborantaj

asocioj laŭpete plialtigis sian kotizon por la Oficejo. Raporto pri la agado «Rake klap», tweede stap» estis sendata al ĉiuj gazetoj kaj aŭtoritatuloj. Aŭdienco ĉe la ministro ne rezultigis ion pozitivan. La Oficejo decidis finance subteni la ekspozicion de infandeseĝnaĵoj, kiu okazis fine de Januaro '50 en Amsterdam. La komunikoj de la Oficejo regule aperis en «De Esperantist». Okazis konferenco kun «afd. Onderwijs van de Veren. van Nederlandse Gemeenten». La Oficejo povus pli efike labori, se la lokaj sekcioj montrus pli da aktiveco.

U.E.A. En 1949, same kiel antaŭajn jarojn, la ĉefdelegito de U.E.A., s-ro P. Moen, akurate plenumis sian taskon. Reprezentantoj en la komitato de U.E.A. estis s-roj P. W. Baas kaj F. Weeke. Pri la universala kongreso en Bournemouth ni jam detale raportis. En la kadro de la Haarlem'a kongreso okazis kunveno de delegitoj, kiun tamen nur malmultaj personoj ĉeestis. Alvoko al la sekciaj estraroj por nomi novajn (fak)delegitojn estis ignorata ĉe la plimulto.

Jen, karaj legantoj, mi por la tioma fojo venis al la fino de mia jarraporto, ĉifoje kelkloke «majora», sed plurloke

similanta litanion. Ne konkludu el tio, mi petas, ke mi estas pesimisto! Sed kial kaŝi antaŭ vi la veron? Vi ja deziras legi laŭveran raporton? Post kompostado de la unua parto de mia raporto, aperinta en la februara numero de N.E., mi ricevis ankoraŭ la raporton de sekcio Hoogezand, kiu post bone sukcesinta kurso akiris diversajn novajn anojn; kontraŭe mi ricevis post longa atendado la malĝojigan sciigon, ke Dokkum estas agonianta. La sekretario de Almelo sciigis, ke la sekcio la futan jaron ne kunvenis kaj Wageningen silentas en ĉiuj lingvoj, inkluzive de Esperanto... La pasintan jaron denove akre sentiĝis la manko pri spertaj kursgvidantoj, agemaj funkciuloj kaj kompetentaj prelegantoj. Feliĉe L.E.E.N. ankoraŭ havas diversajn aktivajn funkciulojn, al kiuj ni ŝuldas multan dankon, sed iliaj ŝultroj kurbigis pro la peza kaj amasiĝanta laboro. Grandparte tamen tiuj fervoruloj jam havas grizajn harojn aŭ havis harojn... Junan kaj freŝan sangon ni ege bezonas! Kuraĝigas min la konvinko, ke Esperanto jam tiom disvastiĝis, ke nenio plu povos endanĝerigi venkon; ke vere... La Estonto Estas Nia!

Mr A.J. Kalma

FINANCA STATO 31 DECEMBRO 1949

	Budĝeto '49	Jarkonto '49	Budĝeto '50
Enspezoj.			
Kotizoj	g. 3.100.—	g. 3.321,51	g. 3.200.—
Donacoj	75.—	140,54	100.—
Libro-Servo	100.—	100.—	100.—
Abonoj	50.—	96,83	100.—
Skriba kurso	50.—	24,34	25.—
Malprofito 1949	585.—	101,52	—
	g. 3.960.—	g. 3.784,74	g. 3.525.—
Elspezoj.			
Organo + redaktoro	g. 2.500.—	g. 2.343,12	g. 1.850.—
Administra estraro	350.—	394,69	350.—
Kunvenoj ĉefestraro	350.—	354,03	350.—
Distriktaj estraranoj	40.—	3,45	10.—
Konsilantoj	10.—	—	—
Delegitoj jarkunveno	186.—	186.—	192.—
Kotizoj U.E.A.	240.—	240.—	250.—
Biblioteko	35.—	35.—	35.—
Cambrego jarkunveno	40.—	40.—	40.—
Ekzamena komitato	15.—	15.—	15.—
Oficejo Esp. ĉe la Instr.	70.—	50.—	50.—
N.C.K.E.	50.—	30.—	30.—
Teatra servo	10.—	2,15	5.—
Reprezentado Univ.kongreso	—	—	200.—
Propagando	64.—	61,30	118.—
Malplivalorigo skribmaŝino	—	30.—	30.—
	g. 3.960.—	g. 3.784,74	g. 3.525.—

BILANCO 31 Decembro 1949

Poŝtĝirkonto	g. 4.427,61	Propaganda kaso	g. 278,36
Kaso	1,20	Kongresa kaso	96,17
Skribmaŝino	12.—	Rezervo Som.kursoj	272,66
Libro-Servo	363,32	U.E.A.	360,93
		Kreditoroj	1.640,10
		Kotizoj 1950	119,50
		Abonoj 1950	4,50
		Donacoj 1950	6,35
		Kapitalo	
		1.1.1949	2.235,08
		Malprofito 1949	101,52
			2.133,56
	g. 4.912,13		g. 4.912,13

PROPONOJ POR LA JARKUNVENO

La ĉefestraro proponas konsenti specialan favorkotizon por ĝejnuloj malpli ol 21-jaraj kaj fiksi tiun kotizon por la jaro 1950 je g. 1,50. Ĝi proponas laŭe ŝanĝi par. 59 kies definitiva teksto do fariĝu : Huisgenoten, jeugdige leden tot de leeftijd van 21 jaar en werkloze leden betalen aan de algemene kas een bijdrage, die door de algemene vergadering in overeenstemming met de begroting wordt vastgesteld. Ĉi tiu teksto do anstataŭ tiun, menciitan en rubriko «proponoj por la jarkunveno» en la februara numero».

La ĉefestraro proponas konformigi par. 60 al par. 58 kaj la nove proponita par. 59 kaj pro tio ŝanĝi ĝian 2-an alineon, kies teksto fariĝu : De afdelingen betalen zo spoedig mogelijk van de ingekomen gelden van iedere afdelingsbegunstiger aan de algemene kas een bijdrage, die door de algemene vergadering in overeenstemming met de begroting wordt vastgesteld.

Klarigo : Estas dezirinde ne fiksi la kotizojn en la regularo, ĉar ili de jaro al jaro povas vari.

zigi la universalan Esperanto-kongreson 1951 en Nederlando. Se tio ne estos ebla, tiam en 1952.

Sekcio Haarlem opinias, ke la nombro da landoj, en kiuj oni povas organizi universalan kongreson, estas limigita. La praktiko montras, ke preskaŭ ĉiuj landoj en Eŭropo, en kiuj oni povas aranĝi tian kongreson, laŭvice sin disponigis. Krom tio la financa situacio en Nederlando ne multe diferencas de tiu en aliaj landoj, do la motivo, ke Nederlando estas tro multekosta por la partoprenantoj, ne validas. La sekcio ankoraŭ atentigas pri la fakto, ke post 1920 ne plu okazis U.E.A.-kongreso en nia lando, do laŭ propaganda vidpunkto estas tre rekomendinde aranĝi denove universalan kongreson en nia lando.

La subskribintoj kontrolis 23-1-'50 la financon administradon de L.E.E.N. pri la jaro 1949, kaj trovis ĉion en plej bona ordo. Ili speciale atentis pri la elspezoj de la ĉefestraro. Evidentiĝis, ke la ĉefestraro faras nur la nepre necesajn elspezojn kaj tiujn en tre ekonomia maniero. La kontrolintoj proponas malsarĝi la kasiston, dankante lin pro tia laŭdinda akurateco.

W. Rosenhart
E. Russell

Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

Akiras PREMION post n-roj 77-78 : S-ro P. H. Mooij (73 p.) el Vorst-Brussel por F.L.E.E. kaj por LEEN.

SOLVOJ.


N-ro 79. *Horiz.* 1. ek; lamp; pied. 2. fotel; apud. 3. elig; car; ok. 4. morbil; urs. 5. el/en; meleagr. 6. koncentr. 7. financ. 8. komand; chambr. 9. rajt; citil. 10. reklam; art. 11. as; jus; il. 12. stuk; gendarm.

Vert. 1. efemer; ras. 2. kol; forest. 3. tim; limak. 4. legom; najl. 5. al; rekantaj. 6. blond; mug. 7. pacienc; se. 8. palac; cia. 9. pur; gepatr. 10. id; urn; mit. 11. or; tabl; ir. 12. dekstr; ulm.

N-ro 80. balado; blokado; grenado; kaskado; parado; ansero; ekzemplero; kulero; sukero; mortero; kazino; kantino; maŝino; parafino; vitrino; betono; burgono; violono; kolono; pensio.

N-ro 81 : KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 1. reklamilo (R); antaŭa parto (R). 2. alkoholo (R); seĝeto (R) 3. objekto el iu multvalora metalo (R); tie oni ŝarĝas ŝipojn (R); vestaĵo (R). 4. tie oni vendas varojn (R); nombro. 5. planedo (R); aro da analogaj aferoj (R). 6. ĝi ne ekzistas sen brulo (R); malpurajo. (R). 7. fariĝi en iu loko aŭ momento (R); kapvesto (R). 8. ridindigi (R); domparto (R). 9. moviĝi (R); preskaŭ senkolora (R); malsano karak-



terizata per furiozeco (R). 10. kuirilo (R); diservo (R). 11. besto (R); nesufiĉo de tio kio estas bezonata (R).

Vertikale. 1. agrablaodoro (R); ridiga (R). 2. herba vegetaĵo servanta por nutri brutojn (R); ruĝa substanco el kiu oni faras juvelojn (R). 3. krei en la spirito bildojn, ne ekzistantajn en la realo (R); aparta branĉo de scienco (R); konjunkcio. 4. senti maltrankvilon pri la fideleco de amato (R); birdeto tion faras (R). 5. abelo tion faras (R); speco de ludkarto (R). 6. kudristino uzas ĝin (R); kiam nokto vualas, ili ĉiuj egalas, diras proverbo (R). 7. antaŭpagi por ricevi la revuon « Esperanto » dum unu jaro (R); speco de ludkarto (R). 8. ĝi abundas en orango (R); suferi pro rezeiro al io perdita (R). 9. sufikso (R); loki (R); remaĉanta mambesto (R). 10. depreni pomon de arbo (R); sur ĝi oni ĉirkaŭvolvas fadenon (R). 11. floro (R); elmeti al danĝero (R).

N-ro 82. SANGENIGMO.

Trovu kvarliterajn radikojn respondantajn al la donitaj difinoj, laŭ jena procedo: forigu unu literon el la unua vorto, alordigu la postrestantajn kaj aldonu novan por formi la duan vorton, k.t.p., ĝis sub 28 vi retrovos la saman vorton kiel sub 1.

1. koloro; 2. teatraĵo; 3. rompiĝi pro interna premforto; 4. centra parto; 5. signo de suvereneco; 6. ĝi gruntas; 7. ŝtopilo; 8. spaco apud domo; 9. bestoj mangas el ĝi; 10. froti malforte per akra objekto; 11. atingi; 12. tien kaj reen premŝovi; 13. esti en bona aŭ malbona sanstato; 14. kolorigilo; 15. korpoparto; 16. ne havanta rektajn partojn; 17. konstrumaterialo; 18. turnmovi fluaĵojn; 19. kulturita; 20. ĝi portas pantalonon. 21. kaŝe forpreni; 22. el ĝi oni faras ĉapelojn. 23. ceremonioj por soleni okazaĵojn. 24. ĝi troviĝas sur la ĉielo. 25. ujo. 26. ĝi estas uzata por skribi; 27. fari libron; 28 kiel 1.

La solvojn sendu la nederlandanoj al S-ro Teunissen, Legmeerstr. 37. A.L., Amsterdam-West, kaj Flandra Ligo al Postbus 342 (Enigmoj), Brussel, antaŭ la 20.3.1950.

XV-a Kongreso de F.L.E.E.

Pentekosto 27 - 28 - 29 de majo 1950

E. OOSTENDE	Aŭg.	182	78.158	95.737	173.895
2. Numa rolo.	Sept.	127	27.367	46.671	74.038
Ni donas ciferojn de envenantaj marŝipoj en 1938	Okt.	63	6.828	7.608	14.436
Belgaj: 345; Danaj: 18; Germanaj: 11; Anglaj: 229; Estonaj: 18; Finnaj: 9; Francaj: 18; Grekaj: 7; Italaj: 5;	Nov.	62	4.876	6.024	10.900
	Dec.	64	10.717	6.710	17.427

Rimarkoj: Evidentas ke la enveno kreskas ege dum la tiel nomataj ban-



FIS-AUKCIEJO

Letaj: 9; Litova: 1; Nederlandaj: 95; Norvegaj: 27; Polaj: 4; Portugallaj: 2; Joegoslavaj: 3; Svedaj: 29. La sumo de la tunmezuro estis 496.167 tunoj. La antaŭan jaron envenis ankaŭ: Islanda: 1; Rusa: 2; Hispana: 4. Dum la sama jaro 1938 envenis ankaŭ 1062 ŝipoj de interna navigado. Tre grava estas Oostende por la trafiko de la pasageroj.

Jen statistiko por la sama jaro 1938.

Jan.	62	8.583	13.627	22.210
Febr.	56	6.275	7.270	13.545
Marto	64	7.259	8.036	15.295
Aprilo	77	27.842	25.359	53.201
Majo	75	16.519	15.692	32.211
Junio	129	41.901	32.762	74.663
Julio	183	89.515	63.310	152.825

sezonoj kaj la libertempoj de Kristnasko kaj Pasko. Oni ne miru pri la granda nombro da forvaĵoj dum Aŭgusto. Ĉiu al la marbordo scias ke oni konsideras la 15-an de Aŭgusto kiel la finon de la bansezono.

Oostende estas ankaŭ grava fiŝisthavejo. Je la fino de 1935 la fiŝistŝiparo konsistis el 20 vaporŝipoj, 250 motorŝipoj kaj 20 malfermitaj boatoj kun aŭ sen motoro.

La produkto de fiŝo en 1931 14 milojno de Kgr. atingis 20 milojnojn en 1935. En 1935 la Oostendaj boatoj en la daŭro de 8 semajnoj alportis 12 milojnojn de Kgr. da haringo. La plej granda parto estas eksportata.

Drs Fernand ROOSE.

Plaatselijk Nieuws

V.E.B. — *Afdeling Antwerpen*: Op 1-2 werd onze jaarlijkse algemene vergadering gehouden. Het bestuur werd herkozen als volgt: dhr. J. Jacobs, voorzitter; dhr. F. Volders, vice-voorzitter en feestcommissaris; dhr. E. Cortvriendt, secr.; mej. Hofkens, 2de secr.; dhr. Meeus, penningmeester; mevr. E. Cortvriendt, bibliothekaresse. Programma Maart luidt als volgt: 8.3. kruiswoordraadsels; 15.3. zangavond (leiding Jacobs); 22.3. laatste schikking bal; 25.3. Bal; 29.3. Spreekbeurt van dhr. E. Cortvriendt « Kial mi estas Esperantisto ». Onze vrienden uit Brussel, Mechelen, Brugge, worden vriendelijk uitgenodigd op ons bal; Zaterdag 25 Maart in de « Nieuwe Carnot » Carnotstraat 60!

V.E.B. — *Afdeling Brugge*: Ziehier beknopt onze activiteit over de periode 15.1.-15.2.

1. Jaarlijkse herkiezing van het bestuur; 2. lezing, over drie vergaderingen verdeeld van de secretaris; 3. twee dringende bestuursvergaderingen ten einde belangrijke beslissingen te treffen; 4. een reis naar Roeselare, waar onze voorz. sprak voor de leden der aldaar gestichte afdeling; 5. daarenboven de afhandeling van de gewone rubrieken.

V.E.B. — *Afdeling Gent*: Op 11-1 lezing door Dhr. Vanneste over de bereiding van marsepein. Op 18.1. voerde Mw Van de Velde het woord over « Dwaasheden », wat zij illustreerde met talrijke en rake voorbeelden. Op 25.1. behandelde dhr. Mertens het onderwerp « Erfenisrechten ». Op 1-2 werd onze jaarlijkse alg. vergadering gehouden. In de Spanogheschool begon een cursus voor beginnelingen, leiding dhr. Vanneste.

V.E.B. — *Afdeling Mechelen*: Buiten de gewone agenda vond ons geslaagde gezellige avond plaats op 18-2-50 in het stemmig zaaltje van de « Drie Peerdekens ». Daarenboven ontvingen wij voor onze « Letervespero » van 8-2 nagenoeg een 80-tal inzendingen uit 19 landen! Programma Maart: 1-3 Spreekbeurt Dr. T. Van Gindertaelen « Alice Nahon kaj ŝiaj Poemoj »; 8-3 Enigmoj; 15-3 Varia Vespero; 22-3 Zangavond; 29-3 Spreekbeurt over « Hispanidaj Neologimoj ».

V.E.B. — *Afdeling Roeselare*: Op 29-1-50 werd een afdeling gesticht. Het bestuur is als volgt: dhr. H. Braekevelt, ere-voorz.; dhr. Vangheluwe C., voorz.; dhr. P. Samyn, vice-voorz.; mevr. M. Billiet, secr.; Penning; mej. Debeukelaere C.; dhr. Van Leuven, raadgever; HH. Demeulemeester J. en W. Nolle; Mej. Dujardin.

De werkvergaderingen worden gehou-

den iedere Maandag van 19.30 u. in de bovenzaal « Patria ». Op de eerste gaf Drs. F. Roose vice-voorz. V.E.B. een lezing over « Esperanto dringt zich op », zeer actueel onderwerp; hij verzuimde niet de beste krachten te besteden voor de Wereldtaal.

Het Bestuur V.E.B. was speciaal tegenwoordig op deze vergadering, zodat er veel belangstelling bestond voor de piepjonge afdeling en veel verwacht wordt van de samenwerking met afdelingen Brugge en Izegem!

(Rim.Red.: ĉion bonan kaj prosperan al la ĵusnaskito!)

V.E.B. — *Afdeling Kortrijk*: Door veteranen onzer vroegere afdeling, werd beproefd de eens zo bloeiende beweging nieuw leven in te blazen. Als inleiding werd een stand geopend in de handelsbeurs, die grote belangstelling genoot. Onlangs werd een propagandavoordracht belegd in het « Middenstandshuis », gevolgd door een cursus met 25 deelnemers, onder de leiding van dhr. Van Leuven.

ANONCETOJ

Ĉiu vorto aŭ mallongigo kostas: g. 0,05 aŭ bfr. 0,75. Minimume: g. 1.— aŭ bfr. 15.—

Hispana nova esp.-isto José Ballester Angnis, adr. Velle de Angel Guimerá 14, Valencia del Cid (Hispanujo), deziras korespondi kun nederlandanoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

47-jara bulgaro, teknikĉemikisto kaj maŝinkonstruisto deziras korespondi pri profesiaj kaj sciencaj temoj kun ĉiulandaj kolegoj. Serioza korespondado nur en E. Tuja respondo. Adreso: Hristo D. Flatareo, HEDEZE, ur. Ĉirpan, Bulgarijo.

Jos Vild, faka instruisto, Rokycany 116/II, Ĉeĥoslovakujo deziras interŝanĝi p.k. kaj p.m. Respondo certa.

« La Ponto », oficiala monata gazeto de Germana Esperanto-Asocio, publikigas en speciala numero dum somero 1950 korespondanconojn de ekstergermanaj samideanoj. Alskriboj al Esperanto-Centro, (13b) München-Pasing, Engelbertstr. 7.

Naskiĝo Bartholomeu: La 2.12.49 naskiĝis fileto (Francisco-Eloi) al Gesanoj Bartholomeu, Caixa Postal 232 Baŭra, Estado de Sao Paulo, Brazilo. Koran gratulon al la Gepatroj kaj ĉion feliĉan al la denaska Esperantisteto!

DIVERSAĴOJ.

La 23-a kongreso de « Sennacieca Asocio Tutmonda » (S.A.T.) okazos ĉi-jare '29 VII — 4 VIII en Torino (Italujo). Kongresotizoj por S.A.T.-anoj 1,75 dol.; por ne-anoj 2,25 dol.; post 1-a de majo resp. 2,25 dol. kaj 2,75 dol. Sekr. de la L.K.K. estas s-ro M. Guzzi, Via Modena 33, Torino.

La sveda konsumkoopera movado eldonis 20-paĝan Esperant-lingvan ilustritan broŝuron « la konsumkoopero kaj la ekonomia vivo en Svedujo », senpage haveblan ĉe Kooperativa. Forbundet, Stocholm 15, Svedujo.

Eksterlandanoj rajlas senpage partopreni la ĉi-jaran kongreson de « Aŭstria Esperantista Federacio » en Vieno 27 V 30 V kaj ĉiujn kongresaranĝojn. Informojn donas la L.K.K., adreso: Neutorgasse 9, Wien I, Aŭstrujo.

« Literatura Mondo » ne plu aperos. Ĉar en 1949 aperis nur 4 numeroj antaŭe 6, la abonantoj rajtas ricevi 1/3 de la jam pagita abonotizoj de la lunda reprezentanto, al kiu ili siatempe pagis la abonprezon.

Vendredon 10.III s-ro R. v. Spronsen parolos antaŭ la mikrofono de N.C.R.V. (Nederlandoj) 17.45-18.00 h. M.E.T. Ondlongo 301 m.

En kristana « U.L.O. »-lernejo en Amersfoort Esperanto estas instruata kiel deviga fako al 75 knaboj.

Ĉeĥoslovaka poŝto atentis Esperanton.

Ĉeĥoslovaka poŝto eldonis serion de 32 bildaj poŝtkartoj, el kiuj 4 portas la ĵenajn esperantlingvajn surskribojn:

2. Praha — Esperantista centro en koro de Eŭropo.

5. Ostrava — Radiostacio en ĉeĥoslovaka regiono de karbo.

8. Turciánský Sv. Martin — Sidejo de Slovaka Esperanto-Instituto.

24. Doksy — Somera Esperanto-Kolegio.

Estas interesa oficiale uzo de nia lingvo, kiu multe utilis propagandon de nia afero kaj la propagandon de vizitindaj lokoj en Ĉeĥoslovaka respubliko. Tiu lando estis ĉiam alloga centro turisma en centro de Eŭropo.

La poŝtkartojn povas liveri Esperanto-Asocio en ĈSR, Malá Stepánská 7, Praha II. Unu ekzemplero, adresita al la petinto, kostas 1 respondkupono. Ne-eŭropaj samideanoj ricevos unu poŝtkarton senpage. Neŭitajn poŝtkartojn en koverto la Asocio ne povas ekspedi.

Surpresita estas poŝtmarko por 150 Kčs, vendoprezo de unu poŝtkarto estas Kčs 3.—.

V.E.B. aŭtobusoj al Parizo U.K.

Parizo. Lum- kaj U.K.-urbo vokas Partoprenu aŭtobusan karavanon, kiu gvidos nia Bruga Sekcio, en plej moderna veturilo! Nur V.E.B.-anoj estos akceptataj kaj pagos 1.000 fr. por

1. veturo ira kaj revena al Parizo!
2. vizito de la plej interesaj lokoj (ekz. Arras, Amiens, ktp).
3. Vizito en Parizo;
4. unu mateno en Versailles.
5. unu posttagmezo al Fontainebleau.
6. unu tuta tago al kelkaj kasteloj de la Loire l'ua la vojo: Chartres, Tours, Blois, Chambord, Orléans.

Lokoj limigitaj. Pliaj detaloj sekvos! Mendu kaj pagu ĉe: F. Roose, J. en M. Sabbestra 36 Brugge, telefon-nro 31989; poŝtekkonto: nr. 428551.

SOMERAJ KURSOJ

Kiel ni jam sciigis en la antaŭa numero, L.E.E.N. kaj F.L.E.E. denove aranĝos somerajn kursojn, ĉi foje en « Oolgaardthuis » en Arnhem, nome de 27 julio - 3 aŭgusto. La partoprenantoj do povos post la kursoj vojaĝi al la Pariza kongreso. La komitato, kiu aranĝos la kursojn, konsistas el s-ino M. A. v. de Wal-Brethouwer kaj s-roj H. Arends, d-ro T. v. Gindertaelen kaj C. B. Zondervan (administranto). Okazos konversaciaj lecionoj por komencintoj, literatura kurso kaj seminario kurso por estontaj ĝenralistoj (la lasta en la nederlanda lingvo). Kursvidos i.a. s-ino M. A. v. d. Wal-Brethouwer kaj la konata instruisto A. Weide el Hamburgo. Vespere okazos diversaj prelegoj. La kotizo (g. 36,—) ĉi foje inkluzivas la kostojn de kelkaj interesaj ekskursoj. Proksimume meze de marto la komitato dissendos specialan prospekton, kiu enhavos ĉiujn necesajn informojn. Adreso por informoj: s-ro C. B. Zondervan, Svecelinkstraat 2, Deventer.

Abonu la internacian — ree aperintan — monatan revuon « Esperanto Katolika ». Giru la jaran kotizon de 60 Fr. al A. Beckers, Overpelt-Fabriek (p.ĉ. k. n° 4217.34.)

Ĉu vi jam posedas la jarlibron U.E. A. ? Mendu ĝin ĉe Fr. Couwenberg, Blankenbergse girante: 35 b. Fr. je lia p.ĉk. 416135!

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond Postbus 342 — Brussel en Ned. Esperantisten-Vereeniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. (Ned.) — Drukkerij: J. Van Laer, Korte Begijnstraat 38, Turnhout.